



LA KOMERCO

Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio

Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4

Agentejoj en: Baden (Svls.), Danzig, Funchal, Hvamstanga, Lawang, Lodz, Maur, Osaka, Plauen, Rechl, Valencia kaj Venezia

La bulteno estas sendata al niaj agentejoj kaj klientoj senpage; neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezono.

Numero 19 + Eldonita en novembro 1933



Sensacia projekto! „La Komercio“ estonte 20-paĝa! Eldonnumero 30 000! Senpage al ĉiuj organizitaj esperantistoj!

Gesamideanoj! Ne dubu pri tiu nia avizo! Nia projekto estas serioze pripensita kaj certe efektivegebla, se en la ĉefaj landoj nur po unu samideano kunhelpos kaj transprenos la laborojn, kiujn ni petos kaj eĉ pagos! La Komercio 20-paĝa kun tute internacia interesa enhavo — 30 000 legantoj! Tio estos unu el niaj plej potencaj propagandiloj inter la komercistaro de la tuta mondo kaj certe pli kaj pli altiros komercon kaj industrion al la uzado de Esperanto en la internacia komercio. Ni esperas, ke oni ekkonos la gravecon de nia paŝo kaj multnombre sin anoncos al kunlaboro! Esperantaj gazetoj estas petataj, represi nian avokon kaj, se eble, indiki al ni taŭgajn kunlaborantojn!

*

Kial ni entreprenas tiun novan riskan paŝon?

Ĉar ni estas konvinkitaj, ke la plej malalta punkto de la mondkrizo estas atingita, ke venos bona konjunkturo, kaj ĉar ni vidis el la eĉo de la unuaj eldono de „La Komercio“ en 10 000 ekzempleroj, ke ni atingos sukcesojn. Alvenis kontentiga nombro da novaj klientoj, kiuj demandas, mendis, laŭdis, proponis, kaj ni estas certaj, ke tiu nombro pligrandiĝos proporcie al la pligrandiĝonta nombro da legantoj. Neniam venkis, kiu ne kuraĝis!

Por la trosagaĵoj!

Varbante por Esperanto inter komercistoj kaj komercumizoj, vi certe ofte renkontas la kontraŭdiron: „Ni ne bezonas Esperanton, ni korespondas en naciaj lingvoj, kiujn ni — kiel ili fiere aldonas — tro bone posedas.“ Por tiaj personoj ni kolektis kelkajn tre instruajn faŝtrudukaĵojn, kiuj klare montras, ke estas trege malfacile, trovi ĉiam la ĝustajn tradukojn kaj ke ofte estas uzataj esprimoj, kiuj signifas ion tute alian. Jen kelkaj ekzemploj:

1. (Ripeto el Komercio n-ro 16.) En franclingva gvidlibro tra Eŭropo oni povis legi „J'ai trouvé que mille part on ne danse mieux qu'ici dans les salles de danse luxurieuses“ („Mi trovis, ke nenie oni dancas pli bone ol ĉi tie en la dancsalonoj malĉastegaj“). Laŭ indiko de Francio oni eraris pri la vorto **luxa** kaj, anstataŭ „luxuriantes“, oni diris la supran vorton „luxurieuses“. Sed ankaŭ tio estas nekorekta, kiel nun skribis francaj samideanoj, ĉar „luxuriant“ signifas laŭ franca kompreno „abunde kreskanta“; la sole taŭga vorto estus „luxueuses“.

2. En franclingva broŝureto pri kuraĉloko apud Trieste oni nomis ĉiujn objektojn, kiujn la malsanulo devas kunporti al la sanigejo. Inter tiuj estis unu paro da „linceuls“, kio signifas laŭ franca kompreno „tukon, en kiun oni envolvas la kadavron de mortinto“. Vere bona reklamo por sanigejo! Certe la tuta reklamefika de tiu reklamo nuligis! Oni devus diri „draps“ (t. e. luttukoj).

Ni estus tre dankaj al niaj legantoj por kolekti kaj transsendi de similaj tradukaj eraroj.

Ĉu estu internacia reklamo nur en Esperanto aŭ plurlingva?

En multaj landoj sekve de la eraroj faritaj dum la postmilita tempo, kaj el la el tio rezultanta mizero, renaskiĝas forta sento

por nacia honoro. Tion ni nepre konsideru kaj tial ni rekomendu estonte por internacia reklamo ne sole Esperanton, sed **la nacian lingvon plus Esperanton** kaj . . . la forlason de la lingvo de la konkuranto! Tiun sistemon ni jam aplikis sur niaj valorokuponoj, kiujn ni aldonas al niaj gramofondiskoj! Nacia lingvo plus Esperanto! Tiel aspektu la estonteca moderna propagandilo de la komercisto! Tiu sistemo krome havas gravajn avantaĝojn kontraŭe al la nur-Esperanta! Unue la presaĵoj estas uzablaj en la en- kaj en la eksterlando, sekve la eldonnumero povos esti multe pli granda. Tre multaj personoj vidas la Esperantan tekston kaj komparas! La eksterlanda ricevinto certe ŝatos, kontroli kaj studi la nacian lingvon en komparo kun la Esperanta teksto! Estos eĉ tre instrue, el lingva vidpunkto, legi tiajn reklamilojn kun malaja kaj Esperanta, hinda kaj Esperanta, persa ktp. kaj Esperanta lingvoj!

Ni estonte agos tiel, propagandante ĉe la germanaj firmoj, kaj ni rekomendas al niaj eksterlandaj kunlaborantoj, agi same! Esperantaj gazetoj bv. represi nian instigon! Ni ŝatus aŭdi, kion oni pensas pri nia propono!

Rigardo en la mondekonomion.

Kion ni priskribis pri paniko en la artikolo „Ĉu Eŭropo denove leviĝos“ en n-ro 18 de nia bulteno, jam fariĝis fakto. Panik-tendenco kaj aliaj farajoj kaŭzis, ke la Dolaro falis je 25% de sia valoro. Kelktempe jam la Holanda guldeno montris malfortecon! Unu malfidas al la alia! Okcidenteŭropo akaparitis dum la unua duonjaro 1933 oron en la valoro de 2 miliardoj da Reichsmark, kiuj malaperis en la poŝoj de singardemaj ŝparemujoj aŭ en la trezorejoj de la bankoj. Tiamaniere la oro estas eltirata el la produktiva cirkulado . . . afero, kiu signifas praktike detruon de kredito. Por konservi proporcie rilaton inter la cirkulantaj bankbiletoj kaj la orkevro, la bankoj devus malmultigi la bankbiletcirkuladon. Tio estus deflacio kun ĉiuj ĝiaj malagrablaj sekvoj.

Tial preskaŭ ĉiuj landoj, kiuj suferis egan orperdon, forlasis la orbazon. Per tio komenciĝis akra ekonomia batalo ĉefe inter Ameriko, Britujo, Japanujo, kiuj serĉas eluzi la (laŭŝanjan) avantaĝon de la falo de la valuto, por konkuri pli grandajn kampojn de la monderkato. Kaj nun estas batalo de unu kontraŭ la alia, kaj oni ne scias, kie kaj kiam finiĝos tiu konkur-kurado. Nek Britujo nek Ameriko estas pretaj forlasi sian „orpolitikon“. En Ameriko oni eĉ propagandas kontrolitan inflacion por . . . kiel oni (laŭ ni: ŝajne) diras, atingi plialtiĝon de la prezoj de la krudmateriaĵoj. La pasintaj okazintaĵoj montris, ke sole per tio daŭra abito ne estas atingebla. La prezoj nepre devas reguliĝi laŭ la leĝoj de „oferto kaj demando“. Tiu orpolitiko estas kontraŭ la aliaj landoj pli akra armilo ol la importkontingentoj kaj altiĝataj doganoj. Dezirinda kaj necesega estas klareco pri la intencoj de la orpolitiko de la gravaj landoj kaj la baldaŭa ripozo sur iu punkto, por permesi al ĉiuj certan kalkuladon kaj senriskan komercadon. La mondekonomia konferenco sub tiaj antaŭsignoj estis kondamnita al senrezulteco. Tamen ĝi ne estis senvalora. Naskiĝis dum ĝi la ekkono, ke ne ekzistas „mondekonomio“ organizita aŭ or-

ganizebla, sed nur „naciaj ekonomioj“, kiuj inter si devas interkontrakti kaj interkonsenti pri la reciprokaj interrilatoj. Trovi vojon el la haoso oni nur povas per propraj fortoj de la propraj lando kaj popolo. Kaj jen ni jam povas vidi la tre ĝojigajn agojn de diversaj landoj provantaj venki el si mem la krizon. Ni esperu ke aliaj landoj ekkonu tion kaj sekvu sur tiu vojo. Se la propra ekonomio estas en bona stato, fido revenos kaj malfermos la pordon al regula internacia komercado.

LA NACIAJ EKONOMIOJ.

Germanlando.

De Aprilo ĝis Septembro ne nur la strukturo de Germanujo, sed ankaŭ ĝia ekonomio estis fundamente ŝanĝataj. Bazante sur la malbonaj spertoj de la antaŭaj jaroj, la germana registaro en senkompare energia maniero prenis la gvidadon kaj direktadon de la popolo kaj de la ekonomio laŭ bone pripensitaj planoj. Oni enkondukas sanajn komercajn principojn, oni faras heroajn agojn kontraŭ la senlaboreco, oni laboras por la bono de la popolo, kiun oni unuecigis. Ĝis nun ekzistis en Germanlando 27 partioj, reprezentantaj la plej diversajn interesgrupojn. Tiu disesto kreis logike malharmonion. Ĉiu vidis — samkiel nun en la mondekonomio — en ĉiu alia sian konkuranton, sian malamikon, kiu devis esti kontraŭbatalata. La litoj estis kontraŭ la domposedantoj, la industriistoj kontraŭ la agrikulturistoj, laboristoj kontraŭ labordonantoj. Inter la oficistoj sole ekzistis proks. 105 fakunuiĝoj, kies plej nobla tasko ĝenerale estis, kontraŭbatali sin reciproke. Tiu disesto feliĉe nun absolute forestas. En klara ekkono la registaro ordonis, ke ĉiu metio nur estu organizata en unu fakunuiĝo, kaj tiu gardu sole la interesojn de siaj anoj. Oni nun instruis, ke la intereso de laboronantoj kaj laborprenantoj estas absolute la samaj. Se la unu suferas, la alia ankaŭ suferas. La tuta popolo ekkonis tiun idealan solvon, kiu kapablas redoni al la popolanoj pacon kaj ĝojon pri progresanta laboro, kaj neimag-eblaj fortoj estas vekataj, kiuj en ideala kunestado kontraŭbatalos la krizon. Dum kiam ni skribas la jenajn liniojn, estas ĵus publikiĝinta la giganta plano de la helpe por la suferantoj dum vintro. Unu por la aliaj! Komunintereso staras super la propra intereso — jen la devizo! Ordo en la financoj, ordo en la administrado, batalo kontraŭ la senlaboreco, tio estas la plej noblaj celadoj de la nuna germana registaro. El propra forto oni esperas, venki la krizon, kaj en kelkaj jaroj certe Germanujo denove estos bona aĉetkapbla kliento de la tuta mondo.

La senlaboreco en Germanujo jam estas malaltigita je ĉirkaŭ 2 milionoj de 6 014 000 en Januaro 1933 ĝis 3 850 000 en Oktobro 1933. Kelkaj provincoj eĉ jam estas tute sen senlaboruloj. Laŭplane oni plifortigas la enlandan merkaton, en unua vico la agrikulturon per saĝaj dekretoj, ĉar oni prave konkludas, ke pro la nuna situacio sur la mondmerkato tiu dum la sekvontaj monatoj ne estos rikoltejo. Fakte la kuneksterlanda komerco en la lastaj monatoj ege malprogresis, sole ekde Aŭgusto ĝi konsiderinde pliboniĝis. Kontraŭe la enlanda merkato preskaŭ ĝenerale pliboniĝis, kiel estas videble el la malprogreso de la senlaboreco kaj el statistikaj ciferoj de poŝto kaj fervojo, kiuj montras levigantajn debitojn.

Germana import/eksportbilanco:

1-a duonjaro 1933	importo	RM 2 268 678 000
	eksporto	RM 3 133 478 000
	aktiveco	RM 864 800 000

Lastaj raportoj el diversaj industrioj:

Maŝinindustrio:	Enlando: iometa plivigliĝo, Eksterlando: malbona situacio.
Ĥemia industrio:	Enlando: daŭra plivigliĝo, Eksterlando: kontentiga situacio;
Bierindustrio:	Enlando: kontentiga evoluo, Eksterlando: Konsiderinda progreso de la eksporto al Ameriko;
Bicikloj:	Plene okupataj;
Teksaĵoj, pintoj:	Stabila situacio kontentiga;
Ŝuoj:	Plene okupataj;

Duonfabrikaĵoj: Metaloj: Pliboniĝo daŭras,
Zinkladoj: Tre bone okupataj,
Kupro kaj stano: Stabila situacio;

Radio: Tre bona okupo. La „Popolricevilo“, malmult-kosta aparato konstruita laŭ instigo de la registaro, jam dum la radiofoiro en Berlino estis elvendita;

Karbo kaj brikedoj: La debito en Junio 1933 pligrandiĝis je 14,1% kontraŭ Julio 1932;

Ŝtalo: Dum la unua duonjaro 1933 la produktado kreskis je 16,6% kontraŭ la sama tempo 1932;

Aŭtomobiloj: Tre bone okupataj;

Cigaretoj: Stabila situacio.

Aliaj signoj de pliboniĝo: La nombro de bankotoj dum Aprilo estis la plej malalta de post la Markstabiligo. La nombro de protestitaj kambioj malkreskis je 50% kontraŭ 1931.

Eksportsubteno per „Scrips“. En la okazoj, kiam la germanaj varoj estas nekonkurencoj, la germana eksportisto rajtas akcepti kiel pagon por certaj vareksportoj „Scrips“ (nur post permeso de la „Golddiskontbank“). („Scrips estas ŝuldatestoj rezultantaj el tio ke la germana regna banko, por konservi la kovron de la bankbiletoj, nun nur permesas pagon de rentoj 50%-e en devizoj kaj 50%-e en Scrips.) Per tiu aranĝo la eksterlanda aĉetanto povas aĉeti certajn germanajn varojn je pli malalta prezo.

Britujo.

Importo dum Aŭgusto	56 754 milionoj da pundoj,
sed en Julio	29 847 milionoj da pundoj,
Eksporto dum Aŭgusto	30 997 milionoj da pundoj,
sed en Julio	33 706 milionoj da pundoj,
Reeksporto dum Aŭgusto	4 300 milionoj da pundoj,
sed en Julio	4 324 milionoj da pundoj.

Ameriko (USA).

La registaro disponigis 3/3 miliardoj da Dolaroj por publikaj laboroj. Ĝis 1.8.33 jam estis foruzitaj \$ 1 023 966 200 por diversaj laboroj (konstruo de pli bonaj ŝoseoj, pliboniĝo de kanaloj, de pontoj, publikaj domoj, loĝejoj). Oni sciigas, ke la Chevrolet Aŭtosocieto dum la unuaj 8 monatoj 1933 vendis 511 433 veturilojn kontraŭ 394 000 dum la sama tempo 1932. La debito ĉe la firmo Woolworth estis dum Aŭgusto 11,5% pli alta ol dum Aŭgusto 1932.

Italujo.

Dum Marto kaj Aprilo 1933 la nombro de la laboristoj okupataj en la Itala industrio estis unufoje 30 000 pli alta ol dum la sama tempo en la krizo. La nombro de la laborhoroj plialtiĝis je 7%.

Ruslando.

	1-a duonjaro 1933	1-a duonjaro 1932	1-a duonjaro 1931
Eksporto	204,6	275,1	366,2 milionoj
Importo	190,9	405,3	517,3 da Rubloj
Bilanco	+33,7	-130,2	-151,1

Esperanto en komerco.

La Bankejo Gebr. Arnhold, Dresden, denove provizis siajn ĵus novpresitajn kreditleterojn per Esperanta teksto.

Tion saman faris unufoje la bankejo S. Bleichröder, Berlino.

La Hungara Ĝenerala Kredito-Banko, Budapeŝto, eldonis tre elegantan varbilon en Esperanto.

Jenaj firmoj eldonis reklamon en Esperanto:

1. Renovit-Vitilo-Werk, F. Paris, Basel (Svis.) pri sanigiloj kaj kosmetikaĵoj.
2. Loewen-Apoteko, Bern, pri ferpreparaĵo „Resangon“.
3. The Vase Press Ltd., 44 Thrapston, Kettering, Northants, Anglujo, pri aeroplanmodeloj.
4. La firmo „Force“ A. C., Fincken & Co., 197 Gt. Portland St., London, pri fortigmanĝaĵo „Force“.